

N. N. 32,  
 Rozbranĉo forĝermadis  
*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
 el trunk' de nobelec'.  
 Prauloj jam kantadis:  
 de Jiŝaj ĝia spec'.  
 Floreton portis ĝi,  
 en akra vintro estis,  
 Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
 Jesaja de profet':  
 Maria netuŝita,  
 de kiu la floret'.  
 Eterne volis Di':  
 naskinta infaneton  
 Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
 alvenas bonodor'  
 Ĝi brilas en la koro,  
 mallumon pelas for.  
 Homido, Dia Vort',  
 nin el sufero helpas,  
 De pek' Savant' kaj mort'.

...

N. N. 32,  
 Es ist ein Ros entsprungen

1. Es ist ein Ros entsprungen  
 aus einer Wurzel zart,  
 wie uns die Alten sungen,  
 von Jesse kam die Art  
 und hat ein Blümlein bracht  
 mitten im kalten Winter,  
 wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,  
 davon Jesaia sagt,  
 ist Maria die reine,  
 die uns das Blümlein bracht.  
 Aus Gottes ewgem Rat  
 hat sie ein Kind geboren  
 und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,  
 das duftet uns so süß,  
 mit seinem hellen Scheine  
 vertreibt's die Finsternis:  
 Wahr' Mensch und wahrer Gott,  
 hilft uns aus allem Leide,  
 rettet von Sünd und Tod.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto numero 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.